

# Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto  
**137**  
somero 2024



leĝa depono ĉe BNF  
ISSN 2609-5203

**federacia retejo**  
<http://www.esperanto-provence.org>

**prezidanto**  
Alain Rémy  
06 30 43 39 60  
alainremy13@yahoo.fr

**aliĝkotozo (kun la gazeto): 6 €**  
> ĉeko al: Espéranto-Provence  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la kasisto  
Marc Gallardo  
Les Hespérides II Bât. B2  
67 boulevard des Alpes  
13012 Marseille  
gallardomarc@ymail.com  
06 09 89 09 14  
> aŭ bankĝiro  
(bankinformoj sendotaj laŭpete)

**sekretario kaj redaktoro**  
Pascal Vilain  
48 avenue Alexis Godillot  
83400 Hyères  
06 42 19 68 51  
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de  
publikotaĵoj por la venonta n°**  
20-a de septembro 2024  
bonvolu sendi al la supra retadreso  
><><  
antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

## Vorto de la prezidanto

Jen estas feritempo, krom por la emeritoj, kompreneble. Kie ajn vi ferias, ĝuu la restadon! Se vi vojaĝas, mi bondeziras al vi agrablan vojaĝon kaj fruktoplenajn renkontiĝojn, eble partoprenojn en Esperanto-eventoj en diversaj landoj. Revenu plenplena je bonega sano, grandegaj fortoj kaj entuziasmo por pli kaj pli disvastigi nian belan internacian lingvon. Al ĉiuj, belegan someron kaj ĝis la revido! Vivu Esperanto!

*Alain Rémy*



## enhavo

2	> federacia agado	14	> ZEO en St-Laurent-du-Var > diversajoj
3	> el la provencaj asocioj	15	> kuirrecepto de leganto
8	> vojaĝemaj esperantistoj	16	> bilde-vorte
12	> Eŭropaj balotoj	17	> leterkesto de la legantaro

# Federacia agado

## Nova estraro en la administra komitato de nia federacio

La administra komitato konsistas nun el 11 membroj:

Arnaud Monique, Duc Goninaz Philippe, Gallardo Marc, Inaudi Rosy, Lafitte Nicole, Oliva Pierre, Rémy Alain, Spanjaard Thierry, Triolle Renée, Vilain Pascal, Wallez Gilles.



Okaze de kunsido en La Ciotat la 10-an de aprilo, la komitato elektis siajn estraranojn:

prezidanto: Alain Rémy

vicprezidanto: Rosy Inaudi

kasisto: Marc Gallardo

sekretario: Pascal Vilain

*de maldekstre dekstren:*

*Pascal, Alain, Rosy kaj Marc*

## Okazigo de FEI-ekzamenoj

Ekzamenoj proponitaj de **Franca Esperanto-Instituto** okazis en Marsejlo dimanĉon la 23-an de junio.

Trapasis ilin 5 kandidatoj:

2 por la 1a-grada, 2 por la 2a-grada kaj 1 por ambaŭ niveloj.

Dank' al la apero de la informo sur la retejo de FEI, iu kandidato venis el... Clermont-Ferrand!

Ekzamenis ilin Renée Triolle kaj Pascal Vilain, ambaŭ membroj de FEI.

Agrabla etoso, komuna pikniko, dum kiu la homoj parolis Esperanton.

Dankojn al CIRA (*Centre International de Recherches sur l'Anarchisme*), kiu pruntedonis sian tre taŭgan sidejon en la centro de Marsejlo.

*raportis R. Triolle*



*Sukcese trapasis la 1a-gradan ekzamenon: Stéphane Dabin Pascal Panarotto Frédéric Gilles Gratulojn!*

*Kaj same sukcesis en la 2a-grada: Marie-Hélène Bertuccelli Frédéric Gilles Renaud Balleyguier Gratulojn!*





**Renée Triolle**

#### Arbre-Espéranto à La Ciotat

La déforestation et le changement climatique ont incité l'ONU à mener une grande campagne de reboisement, à laquelle s'associe UEA, Universala Esperanto-Asocio.

Les espérantistes devraient planter 1000 arbres jusqu'en 2030.

Espéranto-Provence a déjà planté un tilleul à Correns (83).

Le mardi 23 avril, c'est à La Ciotat (13) qu'une soixantaine de personnes ont manié la pelle pour planter un olivier.



paco sed ankaŭ de forto, venko, saĝeco kaj fideleco. Krome, se ĝi nun simbolas Provencon, ĝi estas migrinto, veninta kun la Grekoj, kiuj fondis Marsejlon antaŭ 2 600 jaroj.

Patrick Chevalier zorgis pri la tabulo, pagita de la federacio.



*S-ro Doriol, urbestro de La Ciotat,  
Alain Rémy, prezidanto  
de Espéranto-Provence,  
kaj Renée Triolle,  
el Espéranto-La Ciotat*

Ni miris pri la rapideco kun kiu reagis la urbestro, Alexandre Doriol. Li estas jam tre sentema al la problemo, li plantigis kun la Regiono Sud 300 arbojn en urba parko. En malpli ol 48 horoj, li pozitive respondis, demandis kie ni plantu kaj kiun arbon ni deziras. Pro la loko "Solidareca ĝardeno", ni proponis frukto-arbon, sed pro la sezono, ne eblas planti ĉerizarbon, kiu produktos fruktojn post unu monato: sekve la urbo elektis olivarbon, belan simbolon de

Ni avertis la esperantistojn kaj lokajn asociojn (venis reprezentantoj de Amnesty, Art et Essai Lumière, CIQ Font-sainte kaj aliaj), ni gluis afiŝojn en kulturaj centroj dum la urbo invitis laŭ sia listo "Protokolo". Por ke ne estu nur paroladoj, ni proponis kulturan parton ĉirkaŭ arboj: Musset, kiu deziras, ke oni plantu salikon sur lia tombo, La Fontaine kaj Krylov, ambaŭ inspiriĝas de Ezopo, kiam junuloj primokas maljunulon, kiu plantas arbon.

Anne kantis "O Tannenbaum" en la germana, Patricia deklamis en la angla, Denis en la provenca, Véronica (8-jara) en la ukraina, antaŭ la humura teatr-aĵeto de «trio Infernal»: pro varmigo, degelas glaĉeroj, kiuj liberas mikrobojn. Brassens inspiris nin kaj ĉiuj kune kantis "Apud olivarbo, feliĉegas ni / nia amikar' venos por babilo / Birdojn ĝi manĝigos, ombron faros ĝi / PACON portu ĝi al la mond' en kriz'."



Sekvis aperitivo, kiu proponis fabojn el la ĝardeno: vera mallonga cirkvito! Komuna kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto (laŭ la vortoj de Brocattelli) finis tiun simpatian manifestacion.

La urbo raportis sur sia tt-ejo, la urbestro (malgraŭ la instigoj de siaj sekretarioj, ĉar li malfruis) restis ĝis la fino por "rigardi min rekte en la okuloj, venontfoje"...

Mi do alvokas vin ĉiujn interveni ĉe viaj urbestroj.

Plaĉas al ili, ke dank' al tia arbo, ilia urbo povos eniri la liston de la ZEOj kaj profitos de reklamo ĉe la esperantistoj de la mondo.



### 13 - Espéranto - Marseille Jarfina festeto



Hieraŭ, por la lasta kurso en Marsejlo, ni aŭskultis koncerton de Christophe.

Ni ludis kvizon, trinkis kaj manĝetis.

*raportis Frédéric Gilles*







## 83 - Espéranto - Hyères



*fotoj de la majaj kunvenoj*



## 83 - Espéranto - Lorgues



## 83 - Espéranto - Fréjus - Saint-Raphaël



*Kursoj gvidataj de Christine Graissaguel plu okazas ĉiumerkrede en Saint-Raphaël.*

## Kluba kunveno en Les Issambres

### Georgia Henningsen

Dimanĉon 30-an de junio, membroj de la Esperanto-klubo de Fréjus - Saint-Raphaël ĝojis revidi unu la aliajn en la mirinda restadejo Miléades en Les Issambres, kie bonŝance brilegis la suno. Dum la tagmanĝo okazis interbabiladoj en varma amika etoso.

Poste, Pascal ĉarmis nin per prelegeto pri poezio kaj per kanzonoj kun sia gitaro. Li eĉ kantigis nin ĥore-kore. Ni ĝoje malkovris aron da poemoj-kanzonoj de Brassens en Esperanto.

Dankon al Pascal kaj al ĉiuj gepartoprenintoj, kiuj atestis sian fidon pri Esperantaj fratecaj celoj.



## Unu el miaj preferataj poetoj

*En la tre bona verko "Paŝoj al Plena Posedo", de William Auld, tasko petas, ke oni verku tekston pri la jena temo: "Ĉiu lando, kiel ĉiu individuo, havas sian plej amatan poeton."*

Se ni akordiĝas kun tiu aserto, tio signifas, aŭ ke verkisto aparte kaj nedubeble elstaras, aŭ ke, pro manko de multaj samartuloj, li estas kvazaŭ la sola reprezentanto de sia lando sur la poezia kampo.

Francio tiel riĉas je poetoj, ĉiuepokaj, ke preskaŭ ne eblas paroli pri «la» plej amata.

Kiel eblus kompari Villon, Baudelaire, Hugo, Aragon, Eluard... (kaj multajn aliajn same gravajn)?

Sed tie kuŝas paradokso: la francaj poetoj abundas, iliaj talentoj agnoskitas, la pripoeziaj bretoj facile troveblas en ĉiu biblioteko aŭ librovendejo sed... la plimulto da francoj ne ŝatas legi poemojn.

Je demando pri ŝatata poeto, ĉiuj tamen havos respondon.

Tiurilate meritas dankojn la instruistoj kiuj, pasie sed... perforte... provas amigi kaj parkerigi poemojn al lernantoj kiuj plejofte opinias tion nur teda tasko. Nu... foje okazas miraklo: eĉ jarojn post la deviga lernado de poemo, oni daŭre kapablas ĝin deklami, eĉ konscias pri la beleco de la versoj, kaj tiam senhezite

parolas pri la koncerna poeto kiel pri sia plej amata. Plej ofte estas menciitaj La Fontaine, Maurice Carême, Jacques Prévert, kies tekstoj troviĝas en la poemkajeroj de la infanoj.

Nu... kiu estas por mi la plej amata?

Neniu, aŭ ĉiuj.

Sed mi ŝatus omaĝi al unu kaj nomumi lin ambasadoro de la aliaj: Georges Brassens.

Nuntempa kanzonisto-poeto (1921-1981), Brassens mem ne facile akceptis tiun titolon: «Se vi volas loki min inter la poetojn, vi rajtas, sed mi ĉiam malanigas min el ili.» aŭ «Mi estas ne poeto, sed kanzonfaranto.»



Jacques Yvart  
kaj Georges Brassens

Li celis nur distri la publikon. Sed tiel farante, al multaj li amigis tekstojn kun grava signifo, riĉa vorttrezoro, kaj poezieco kiu tutcerte toleras komparon kun tiu de la «klasikaj» poemoj. Okazas foje, ke nura teksto lia enhavas pli da delikateco kaj sentemo ol tuta verkaro de agnoskita poeto.

Jen opinio pri Brassens de G. Garcia Marquez, laŭreato de la literatura Nobelpremio en 1981: «Antaŭ kelkaj jaroj, okaze de literatura diskuto, iu demandis pri la plej fama tiama poeto en Francio. Mi senhezite respondis: Georges Brassens.»

Kaj admirantoj liaj, famaj verkistoj: Joseph Kessel, Marcel Achard, Marcel Pagnol, René Clair... emis igi lin franca akademiano, en 1967. Brassens rifuzis, sed ricevis en la sama jaro la Poezian Premion de ĉi tiu akademio.

La jam citita René Clair diris: «Poeto lasu spurojn pri sia ekzisto, ne pruvojn. Nur la spuroj revigas.»

Ĉu la francaj kaj eksterlandaj interpretistoj (pli ol 570!) de la kanzonoj de Brassens, kaj la multnombraj tradukoj (en pli ol 30 diversajn lingvojn, inkluzive Esperanton), iel ne estas tiuj spuroj, atestoj de la nedubebla poezia talento de tiu poeto?


Plie, ni ne forgesu, ke Brassens kontribuis al la ioma popularigo de la poezio - cetere malfacila - kantante poemojn de aliaj aŭtoroj, pli multnombraj ol oni certe pensas: Alfred de Musset, François Villon, Gustave Nadaud, Paul Verlaine, Victor Hugo, Paul Fort, Louis Aragon, Jean Richepin, Antoine Pol, Alphonse de Lamartine, Francis Jammes, Théodore de Banville, Norge, Aristide Bruant.

Ekzemple, ne malmulte da francaj infanoj konatiĝis kun la poeto Paul Fort, parkerigante la tekston «La eta ĉevalo». Ili tion ŝuldas al Brassens kiu enmuzikigis la versojn.

Resume, nenio en la vivo de Brassens, en liaj verkado kaj klopodo amigi la poezion, malebligas atribui al li la titolon: «Unu el la plej amataj poetoj francaj».


*Ĉu vi havas ideon pri la nombro de tekstoj de Brassens jam tradukitaj en Esperanton? 69, laŭ mia scio.*

*Ĉu vi konas Esperantajn titolojn de kanzonoj de Brassens?*



<  
2 albumoj  
de J. Yvart  
kiu kantas  
Brassens  
(eld.  
Vinilkosmo)

>  
kantlibro  
pri Brassens  
eld. Esperanto-  
Gironde



## Eŭropa Esperanto-kongreso 2024 de la 8-a ĝis la 12-a de majo

### Frédéric Gilles

Estis la unua fojo, ke mi partoprenis Esperantan kongreson fizike. Ĉeestis 600 partoprenantoj, kaj mi konis neniun krom la marsejlanoj Renée, Thierry kaj Marc. Mi ankaŭ renkontis por la unua fojo Marta el Italio, kiu estis en mia pasinta reta grupo de Esperanto.



*Laŭ la listo de aliĝintoj ĉeestis 10  
Provencanoj. Jen 8 el ili sur la foto.*

La kongreso konsistis el pluraj prelegoj, ludoj, laborgrupoj, renkontiĝoj, ekskursoj kaj koncertoj.

Mi partoprenis en la prelego de Renée Triolle pri Lidja Zamenhof. La ĉambro estis plena. Kelkaj homoj eĉ sidis sur la

planko.

Mi partoprenis ankaŭ informan kunsidon pri KER-ekzameno kun Katalin Kováts, kaj la prelegon de Bernard Pidancier pri abeloj. Ĝi estis tre interesa, kaj mi lernis multajn Esperantajn vortojn.

Evento, kiun mi tre ŝatas, estis la paroliga ludo, kiu nomiĝas «100 paŝoj por vortemuloj», kun Sylvain Lelarge.

Ene de la konferenceto estis libroservo. Ĝi estas librovendejo kun centoj da libroj en Esperanto. Mi aĉetis kelkajn.

Ekstere de la konferenceto, okazis pluraj ekskursoj :

- vizito de la katedralo de Strasburgo, kun ĝia fama astronomia horloĝo, kiu sonorilas ĉiun kvaronon de horo.
- Ekskurso al Monto Sankta Odilio, vizito de muzeo de mielkuko kaj vizito de la urbo Obernai.
- Ŝippromenado per plezurŝipo sur la rivero Ill. La ŝipo kunportis nin tra diversaj kvartaloj de Strasburgo: «La Petite France» (Eta Francio), la Eŭropa Parlamento. Ni iris kaj reiris tra klusoj.

En la vespero, okazis koncertoj. Ĉar estis tro da homoj por eniri la koncertejon, ni devis elekti inter du sesioj: aŭ je la 8-a, aŭ je la 10-a vespere. Plejparto de la kantoj estis en Esperanto.



Mi tre ŝatis la kantistinon, kiu ludis harpon, kaj kantis en ses lingvoj.

Oni ne povas eliri Strasburgon sen gustumi la lokajn manĝojn: la «tarte flambée», kaj la faman saŭkraŭton (choucroute).

### ***Renée Triolle***

Lors du Congrès européen d'espéranto qui a réuni à Strasbourg 600 personnes d'une trentaine de pays, les espérantistes provençaux ont payé de leur personne !



*Vendredi 10 mai, le stand pour informer les visiteurs du Parlement européen.*

"J'ai été agréablement surprise, déclare Renée. Les gens savaient ce qu'est l'espéranto et réagissaient favorablement,

Mi tre ĝuis tiun semajnon. Mi renkontis kaj mi parolis kun multaj homoj de pluraj landoj: Italio, Germanio, Nederlando, Belgio, Latvio, Israelo, Hispanio, Hungario. Ĉiam en Esperanto.

Mi antaŭĝojas denove partopreni venontajn kongresojn.

ou ne savaient pas et écoutaient avec attention".

Avec la traduction simultanée, 20% des informations se perdent; comme souvent on a recours à une langue-pont (on traduit en grec ou danois etc. à partir de la traduction en français ou allemand, et c'est encore 20% de 80% qui se perdent. Quant à la Commission, elle publie uniquement en anglais 90% de ses travaux ou directives, alors que seuls 10% des Européens comprennent l'anglais, même si tous ont consacré des années d'étude à son apprentissage.

Que de temps, d'argent et d'énergie perdus !

### **Carmen Segarra en Hispanio**



Sufiĉis nur 5 minutoj al Ĥimena, pranevino mia, scivolema kaj ludema, por legi perfekte en Esperanto. Ŝi loĝas en la Valencia provinco.



En mia vilaĝo Barxeta, jen Santina, pranevo de esperantisto, kiu ne plu vivas.

Tamen, mi povis paroli kun ŝi Esperante.

## Interkant' en Greziljono

### Bernard Bigonnet

Fine de aprilo, de la 21-a ĝis la 26-a, la **koruso Interkant'** laboris kiel kutime en Kastelo Greziljono.

Korusanoj provludis dum ses tagoj en ĝoja kaj amika etoso. La trivoĉaj kantoj fontis el popola, nuntempa aŭ renesanca repertuaroj.

Finfine ni donis koncerton en maljunulejo de Baugé, la urbo kie kuŝas la Kastelo.



Oktobre, post nia venonta staĝo, okazos koncerto en granda salono de Baugé kun du invititaj korusoj el la regiono.

Kaj denove dum printempo ni retrovos la Kastelon!

Venu kanti kun ni!

Kontaktu min:

espero84@aol.com 06 49 98 56 93

aŭ la Kastelon: kastelo@gresillon.org

Pli da informoj ĉe:

[https://gresillon.org/spip.php?page=rubrique&id\\_rubrique=2&lang=eo](https://gresillon.org/spip.php?page=rubrique&id_rubrique=2&lang=eo)

(ndlr: Bernard Bigonnet estas ĥorestro dum la staĝoj kun Interkant')

## « Histoire(s) et Paix », la fête des 10 ans de l'association La Courtine 1917 à Gentioux (23)

### Yves Le Car

Le vendredi 14 juin, j'étais à Gentioux, une petite ville de la Creuse, avec les enfants des écoles de la commune et ceux de Faux-la-Montagne (90 homidoj) que j'ai emmenés en voyage à bord de «**Nubido**», mon petit nuage, vers le pays du Rêve (**la lando de l' sonĝo**).

Un conte pacifiste qui conduit les enfants vers d'autres enfants; tous les enfants du monde se retrouvent et se



*inscription "Maudite soit la guerre"  
sur le monument aux morts  
de Gentioux*

comprennent grâce à Nubido qui sait traduire leurs mots. Ils rencontrent des enfants qui vont à l'école en cerf-volant, des papillons qui mettent plein de couleurs dans le ciel et font cesser les guerres, un escargot qui part faire le tour du monde, une libellule impassible contre le vent, tous les petits êtres qui tous ensemble, groupés, sont plus forts que la haine et la violence.

Belle histoire qu'ils ont bien appréciée.

J'ai même profité du fait que l'orphelin du monument était en réfection pour le prendre avec nous sur Nubido et répandre dans le monde entier son message de paix: **«Maudite soit la guerre»**.

*ndlr : Yves Le Car, membre de Espéranto-Provence habitant à Aubignan (84), est un poète, conteur pacifiste, membre de l'association La Courtine 197.*

## Reveno fonten, en Dunkirko

### Pascal Vilain

En Dunkirko, de kelkaj monatoj, revigligas Esperanton eksa lernanto mia, Eddy Goubinat, el la epoko kiam Mari-Roza kaj mi zorgis pri la asocio "Dunkerque-Espéranto".

Post okazigo de ĉiumonataj kursoj en diversaj lokoj de Dunkirko (mediateko, teatro, kafejo, brokantejo...), li nun proponas ilin dufoje monate kaj intencas baldaŭ instrui ĉiusemajne.

Dum maja restado en mia devenurbo, mi profitis la okazon por partopreni en unu el liaj kursoj, kaj ankaŭ ĉeesti kun li en lingva forumo.



**ATELIERS DES LANGUES**  
**CAP SUR LA MOBILITÉ**

**ADLLD**

**TRAVEL**

**18 MAI 2024 - COMMUNAUTÉ URBAINE DE DUNKERQUE - DE 11H À 16H30**

Prêts à relever le défi ?  
Rejoignez-nous et testez vous aux langues enseignées sur le territoire.

Parti, où ? Quand? Comment?  
Rencontrez les enseignants qui proposent différents types de nuitées au départ de Dunkerque.

ENTRÉE LIBRE

## Thierry Spanjaard

En junio, Espéranto-Marseille havis la ŝancon bonvenigi Andrea-n, kiu venis viziti nin el Italio.

Li loĝas en Torino kaj aktivas en la tiea Esperanto-Asocio. Li estas duone franco kaj italo, naskiĝis en Marsejlo, kie li daŭre havas familion. Andrea renkontis plejparton de la kutimaj partoprenant-

oj en niaj ĵaŭdaj kunvenoj, kaj ni ĝoje babilis dum tuta horo.



## Eŭropaj balotoj

La 10-aj balotoj por la Eŭropa Parlamento okazis de la 6-a ĝis la 9-a de junio 2024 en ĉiuj 27 membroŝtatoj de la Eŭropa Unio. Kiel kutime, EDE - Europe Démocratie Espéranto, partoprenis en la balotoj, kun du kandidatoj el nia federacio, Monique Arnaud kaj Renée Triolle.

### Monique Arnaud



"Espéranto, langue commune"

9 juin 2024 - Sur le Pont de l'Europe à Strasbourg-Khel, nous sommes qui en Allemagne, qui en France, réunis pour chanter l'Hymne à la Joie : une partie des candidats pour les élections européennes avec Laure Patas d'Illiers et Pierre Dieumegarde.

Un bon moment pour les candidats !

## Rezultoj de la listo EDE

### - Francio

> 0,04 % - 10 349

### - regiono PACA

> 0,03 % - 622

### - laŭ la departementoj de PACA

> 0,04 % - 031 en Alpes-de-Haute-Provence

> 0,07 % - 045 en Hautes-Alpes

> 0,02 % - 098 en Alpes-Maritimes

> 0,03 % - 200 en Bouches-du-Rhône

> 0,04 % - 159 en Var

> 0,04 % - 089 en Vaucluse



## Afiŝado

Supozeble, pluraj el vi partoprenis en la afiŝado por la listo EDE.

Mi ricevis fotojn el Saint-Raphaël, kie aktivis i.a. Monique Prezioso kaj Carmen Ségarra.



## Carton rouge !

Dans la rubrique «L'œil de Sire» de l'hebdomadaire «Franc-Tireur» n° 132 du mercredi 22 mai 2024, un article intitulé «Les listes Kamoulox» parle de la liste EDE pour les élections européennes qui ont eu lieu le 9 juin. Je vous laisse juge du niveau de sérieux de son auteur, Benjamin Sire.

*«Si les européennes intéressent peu nos concitoyens, elles attirent pourtant cette année un nombre record de listes. [...] Parmi elles... c'est un festival de radicalité et de baroque à fleur de «Kamoulox». [...] Non à l'UE et à l'OTAN, communistes pour la paix et le progrès social, et l'inévitable Espéranto langue commune, faisant regretter l'absence d'une liste défendant le volapük, l'autre dialecte confidentiellement universel. Sursaut démocratique ou grand guignol ?»*

Pour ceux d'entre-vous qui ignorent le sens du mot kamoulox, voici ce qu'en dit un article de l'Internet :

«Au-delà de son origine télévisuelle, «Kamoulox» a transcendé son cadre initial pour devenir un symbole d'absurdité et de dérision face à des situations illogiques ou inattendues. Dans le discours populaire, l'expression sert souvent à mettre fin à une conversation qui atteint un niveau de non-sens insurmontable, ou pour exprimer une réaction face à des événements déroutants ou incompréhensibles. Le terme incarne une forme d'humour particulière, où le ridicule et l'absurde se mêlent pour créer une échappatoire comique aux rigueurs de la logique.»

Benjamin Sire peut-il dorénavant être considéré comme faisant partie d'une liste de journalistes «Kamoulox» ?

*Si vous connaissez ou trouvez d'autres perles ayant ce niveau d'absurdité, n'hésitez pas à me les envoyer pour alimenter cette rubrique. (P.V.)*

## ZEO-j en Regiono «SUD / PACA» > 14 –St-Laurent-du-Var (06)

Kutime, mi pli malpli sukcesas en la serĉado de dokumentoj, fotoj... pri la ZEO-j de nia regiono. Ĉi-foje ne! Mi scias, ke estas (-is?) "Allée Zamenhof" en Saint-Laurent-du-Var.. Mi do telefonis - vane - al la urbodomo kaj turismoficejo. Neniu volis helpi min, ekzemple proponante al mi sendi foton de la stratplato. Mi nenion trovis ĉe "Googlemaps". Mi provis ĉe najbaroj de la vojo... al fotisto (li transloĝiĝis!)... al advokato kaj kolegio "Saint-Exupéry", kiuj promesis sendi foton sed tion ne faris. Se iu el vi iam vizitos Saint-Laurent-du-Var, bonvolu iri ĝis tiu "Allée Zamenhof" kaj sendi al mi foton. Antaŭdankojn! (P. V.)

## Diversaĵoj

### Paderborn: fama germana urbo

Se vi kutimas atente informiĝi pri la ĉiutagaj novaĵoj en Francio, vi ne povis preteratenti tiun pri... pri... (ne, mi ne intencas paroli pri la nialanda politika situacio!) pri... la Eŭropa Futbal-Ĉampionado «**Eŭro 2024**», kiu komenciĝis en Germanio la 14-an de junio kaj finiĝos (aŭ -is, depende de la ricevdato de ĉi tiu somera numero de nia gazeto) la 14-an de julio.

Se vi interesiĝas pri piedpilko («Kiom da homoj, tiom da gustoj»!, Zamenhofs proverbo 262), vi tutcerte eksciis, ke la franca teamo instaligis en la regiono de **Paderborn**.

Laŭdire, ĉi tiu kvietra urbo (kun tamen 150 000 loĝantoj) ne estas tre konata eksterlande.

Sed ni, esperantistoj, jam aŭdis aŭ legis pri ĝi, ĉu ne?

Kial?

La «**Metodo de Paderborn**» aŭ «**Sistemo Paderborn**» estas metodo de Lingvo-Orientiga Instruado (LOI) laŭ

sciencaj esploroj en Paderborn por instruado de fremdaj lingvoj al infanoj en elementaj lernejoj.

La unua vera eksperimento laŭ la Paderborna modelo kun preciza mezurado kaj kalkulado laŭ formuloj de la kibernetika pedagogio estis entreprenita de prof. Helmar Frank en Paderbornaj elementaj lernejoj en 1975 kaj 1976, en kiuj Esperanton lernis preskaŭ 300 lernantoj, parte unu jaron kaj parte du jarojn, kaj poste ili daŭrigis lerni la anglan lingvon. Tiu eksperimento montris, ke tiuj, kiuj lernis Esperanton ĉirkaŭe dum 100 lernohoroj en du jaroj, havis je 30% pli bonajn rezultojn ol la nelernintoj, dum tiuj, kiuj lernis nur unu jaron, havis jam je 20% pli bonan rezulton.

Se vi volas scii pli pri ĉi tiu temo, iru al la Wikipedia paĝo:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Metodo\\_Paderborn](https://eo.wikipedia.org/wiki/Metodo_Paderborn)



**Rosy Inaudi**

## Mola kuko kun kaŝtanfaruno

### ingrediencoj kaj kvantoj

1 pinĉaĵo da salo  
1 kulero da likva vanilo  
1 saketo da bakpulvoro  
10 cl da olivoleo  
180 g da blanka aŭ kana sukero  
160 g da kaŝtanfaruno  
10 cl da lakto  
4 ovoj  
5 cl da brando aŭ rumo



*Kiel sur la foto, vi povas aldoni flokajn migdalojn por dekoracio.*

*Se ankaŭ vi emus diskonigi  
ŝatatan recepton vian,  
ne hezitu sendi ĝin,  
akompanatan de bildo  
kapabla vekti nian apetiton.*

*Ĉi tiu recepto-kolekto povus iĝi  
kutima rubriko de nia gazeto.  
Antaŭdankojn...*

Paŝo 01: Verŝu la kaŝtanfarunon en salatujon.

Paŝo 02: Se la faruno estas amasa, vi povas kribri ĝin unue.

Paŝo 03: Aldonu la sukeron kaj feĉon, miksu per skuilo, poste formu puton.

Paŝo 04: Verŝu la lakton kaj oleon.

Paŝo 05: Apartigu la ovoflavojn de la ovoblankojn (rezervu la ovoblankojn en alia bovlo).

Paŝo 06: Aldonu la ovoflavojn, kaj miksu bone.

Paŝo 07: Aldonu la brandon aŭ rumon kaj la likvan vanilon, kaj miksu bone denove.

Paŝo 08: Antaŭvarmigu la fornon je termostato 6 aŭ ĉirkaŭ 180 °C.

Paŝo 09: Batu la ovoblankojn ĝis rigidaj, tiam milde aldonu ilin al la kaŝtana preparado.

Paŝo 10: Buteru kaj farunu paton, aŭ kovru ĝin per bakpapero aŭ aluminio (krom se ĝi estas silikone ŝirmita).

Paŝo 11: Atentu, normale la kuko bone ŝvelas (ĉirkaŭ duoble de sia volumeno), do, por eviti superfluan, estas pli bone uzi altan ujon.

Paŝo 12: Metu en la fornon kaj kuiru dum 50/60 minutoj.

Paŝo 13: Piku la kukon en la centro, la klingo devas eliri pura.

Paŝo 14: Lasu malvarmiĝi.

### *Pascal Vilain*

Mi certas, ke vi jam vidis ĉirkaŭ vi, hazarde de viaj promenadoj, vortojn kiuj ekzistas en nia lingvo Esperanto.

Ekzemple, mi fotis la vorton «**dika**» en strato de la malnova Tulono. Temas pri butiknomo; mi eĉ ne atentis pri kio estas vendata tie.



Alian tian vorton mi vidis sur la ĉefplaco de Aalst, en Belgio. Aalst, en la nederlanda, aŭ Alost, en la franca, estas la urbo, kie vivas familianoj de mia edzino Mari-Roza.



*Dirk Martens aŭ Thierry Martens  
(Theodoricus Martinus),  
naskiĝinta en Alost en 1446 aŭ 1447  
kaj forpasinta en Alost en 1534.*

La fotita vorto, «**Alostano**», signifas en Esperanto «loĝanton de Alost». Eblas diri ankaŭ «Aalstano», same kiel Parizano aŭ Bruselano.

Kie mi trovis la vorton «Alostano»?

Sur statuo de Dirk Martens, konata ĉefe kiel unua eldonisto de Utopia, la ĉefverko de Thomas More, en 1516.

Dirk Martens estis ja Alostano!



*Statuo de Dirk Martens, maldekstre de belfrido, sur la ĉefplaco de Aalst*

Se ankaŭ vi foje vidos Esperantan vorton en via ĉirkaŭaĵo, bonvolu ĝin foti kaj sendi al mi, kun indikoj pri la loko. Tio povus iĝi kutima rubriko en nia gazeto, ĉu ne?





## El la leterkesto de la legataro

Kiam mi sendas novan numeron de nia gazeto *Espéranto-Provence*, mi ĉiam aldonas en mia mesaĝo: «Ne hezitu sendi viajn komentojn pri la nuna gazeto, kaj kontribuaĵojn por la sekva.»

Nu... ne eblas diri, ke multas la reagoj... Sekve, mi ege ĝojas, kiam iu(j) tamen atingas min.

Pri la printempa numero 136 alvenis reago de **Michel Dechy**, prezidanto de la asocio «Lille Villeneuve Espéranto», kiu komentis mian artikolon «Bildevorte...», videblan sur la paĝo 16.

Michel unue rimarkigis al mi mankon de akuzativo en la esprimo «la 7 katolikaj(n) virtojn». Jes ja, kaj mi hontas prie! (nur iomete, tamen!)

Antaŭe, Mari-Roza relegis la tutan gazeton. Nun, nur mi tion faras, sed ĉiu bone scias, ke se relegas la verkinto mem, ĉiam restas eraroj tajpaj aŭ gramatikaj... (eĉ gramatiklaj!)

Plie, Michel tre trafe diris al mi, ke se mi skribus: «Ĉiuj cetere konas la jenan liston:...», anstataŭ: «Ĉiuj bone konas:...», mi povus eviti la uzadon de akuzativo en ĉiuj sekvaj esprimoj.

Fine, li atentigis min pri eraro: en mia tuta teksto, mi uzis pri 7 la vorton «cifero», kiam temis fakte pri «numero».

Mi do ege dankas Michel, des pli ke li proponis sendi al mi tekston por nia gazeto. Vidu kaj legu ĝin sube...

*Pascal*

### Michel Dechy

Karaj geamikoj de Suda Francio kaj kara Pascal Vilain, ĉefredaktoro de via bela kaj interesa revuo *Espéranto-Provence*. Unue dankon kaj gratulojn pro la kvalito de via revuo. Due gratulojn al la tuta skipo, kiu reprenis la torĉon por daŭre organizi MES en Les Issambres.

Interesa foto kaj artikoleto paĝo 16 de la revuo pri la nombro 7...

## La Magiaj Nombroj

Sufiĉe ofte, homoj kaj eĉ ĵurnalistoj, tro ofte laŭ mi ĉe la televido dum la informoj, konfuzas la vortojn nombroj kaj ciferoj.

Se vi demandus, ĉu 7 estas nombro aŭ cifero, multaj homoj respondus ke 7 estas cifero, kvankam ĝi estas nombro, skribita VII laŭ la romana skribo de la ciferoj.

7 estas la cifero de la unuoj en la nombro 17, kaj 7 estas la cifero de la dekoj en la nombro 72. La homoj ne «inventis» la nombron 0 tiel frue ke la nombrojn 1, 2, 3, ktp. Kial nombri kiam oni havas nenion? Sed tiu cifero 0 ege gravas en la nombro 107, ĉu ne?

En la nombroj, kelkaj estas «magiaj».

### La nombro 3:

La Tri Magoj (Melchior, Gaspard, Balthazar, kvankam oni forgesis la kvaran Artaban); la Tri Unuo (Patro, Filo kaj Sankta Spirito); la fama tri ĉevalveto, kiu dum jaroj ŝtelis monon al multaj malriĉuloj por foje riĉigi kelkajn bonŝanculojn. La Tri Musketeroj (Athos, Porthos, Aramis, kvankam kun Darta-gnan ili estis 4).

### La nombro 4:

La kvar Ĉefpunktoj (Nordo, Sudo, Oriento, Okcidento). La kvar emblemoj de la kartludoj (piko, trefo, karoo kaj kero).

Fakte la japanoj ne ŝatas tiun nombron kvar, kies prononco similas al la prononco de morto... Same kiel la nombro 13 ĉe nia franca kulturo. Kaj en la ĉina kulturo ege gravas la nombro 8; la Malferma Ceremonio de la Olimpiaj Ludoj okazis la okan de aŭgusto 2008 en Pekino).



Ĉu mi rajtas reklami pri «mia» libro: «**La bildstrioj kiel lernolibroj**»? Je la paĝoj 18 kaj 19, mi dediĉas kelkajn liniojn al tiuj magiaj nombroj... Imagu la titolon de tiu leciono: «Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras»!

### La nombro 7:

La 7 tagoj de la semajno; la 7 saĝuloj de Helenio; la 7 virtoj de la katolikoj; la 7 mortomeritaj pekoj; Neĝulino kaj la 7 nanoj; la kartludo «la 7 familioj», la 7 mirindaĵoj, la 7 samurajoj, la 7 solduloj, la 7 koloroj de la ĉielarko, kvankam la sciencistoj trovas multe pli..., la 7 branĉoj de la juda kandelingo, la 7 petoj en la preĝo «Patro Nia», vi rajtas legi la faman serion de la Aventuroj de Tinĉjo kiam vi aĝas de 7 al 77 jarojn...

Kiomfoje povu peki mia frato kontraŭ mi kaj mi pardonu lin? Ĝis 7 fojoj!

Fakte mi ne scias ĉu la kandidato François Hollande, dum la televida debato kontraŭ Nicolas Sarkozy, anafore ripetis sepfoje: «Mi, kiel Prezidento, ne kondut-os kiel vi kondutis...».

### La nombro 12:

La 12 monatoj de la jaro; la 12 Apostoloj; dufoje 12 horojn ĉiutage; 24 bildoj sekunde en kinoarto...

Kiam iu juna franca lernanto nombras per la fingroj, li nombras ĝis dek, sed iu baratdevena amiko, instruisto pri matematikoj, klarigis al mi ke infanaĝe li nombris per la fingroj helpe de la dikfingro antaŭ la 12 falangoj de sia dekstra mano. Kompreneble li kapablas nombri ĝis 2 foje 12 sed ankaŭ ĝis 12 foje 12, dank' al sia maldekstra mano.

*Lastmomente, ĵus antaŭ la enpaĝigo de ĉi tiu gazeto, mi ricevis de ano de nia federacio plian tekston pri la nombro 7. Dankon al Lucas. Jen ĝi... (ndlr)*

### **Lucas Périer**

Mi legis ĉe la deksepa paĝo de la printempa gazeto *Espéranto-Provence*:

"Ĉu vi pensas pri alia uzo de 7 en konata(j) esprimo(j)? Kial tiu ofta uzo de la cifero 7? (...) Se taŭgan respondo vi jam konas... ne hezitu ĝin sendi al mi."

Fakte estas respondo en *La Libro de Urantia* (kiu estos esperebla iam legebla en Esperanto dank' al skipo de esperantistoj)

Jen teksto pri tio:

"16:0.1 (184.1) Les Sept Maîtres Esprits du Paradis sont les personnalités primaires de l'Esprit Infini. Dans ce septuple acte créatif de dédoublement de soi, l'Esprit Infini a épuisé les possibilités mathématiques d'association inhérentes à l'existence factuelle des trois personnes de la Déité. S'il avait été possible de produire un plus grand nombre de Maîtres Esprits, ils auraient été créés, mais il y a juste sept possibilités d'association, et seulement sept, qui soient inhérentes à trois Déités.

Cela explique pourquoi le fonctionnement de l'univers est scindé en sept grandes divisions et pourquoi le nombre sept est une base fondamentale de son organisation et de son administration.

16:0.2 (184.2) L'origine des Sept Maîtres Esprits provient des sept similitudes suivantes dont ils tirent leurs caractéristiques individuelles :

16:0.3 (184.3) 1. Le Père Universel.

16:0.4 (184.4) 2. Le Fils Éternel.

16:0.5 (184.5) 3. L'Esprit Infini.

16:0.6 (184.6) 4. Le Père et le Fils.

16:0.7 (184.7) 5. Le Père et l'Esprit.

16:0.8 (184.8) 6. Le Fils et l'Esprit.

16:0.9 (184.9) 7. Le Père, le Fils et l'Esprit."

La tuta libro legeblas tie sur retejo :

<https://www.urantia.org/fr/le-livre-d-urantia/fascicule-16-les-sept-maitres-esprits>

## **Datoj aldonendaj al tiuj de la agendo sur la sekva paĝo**

**7-an de julio:** en Gap, Paco-Festo kun Esperanto-budo

**forumoj de asocioj en septembro**

. **1-an:** Vivacitè en Marsejlo

. **7-an:** La Ciotat kaj Saint-Raphaël

. **14-an kaj 15-an:** foiro Génèpi en Gap

Certe iam en le Beausset, sed je dato ankoraŭ ne konata.



## À noter sur votre agenda

### dans notre fédération

*Plusieurs cafés linguistiques "espéranto" :*

**1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille (13)**

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6ème

*infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

**dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères (83)**

bar de l'hôtel Ibis-Gare - 45 rue Edith Cavell (face à la gare)

*infos : Pascal Vilain - 06 42 19 68 51*

**dernier jeudi de chaque mois - 17 h - Lorgues (83)**

"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

*infos : Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02*

**novembre 30 / décembre 1er - La Garde (83)**

Fin de semaine culturelle au domaine de Massacan

*Le bulletin d'adhésion sera envoyé par message en septembre et ajouté à la revue d'octobre.*

**mars 2025 - 15-22 - Les Issambres (83)**

Mediterranea Esperanto-Semajno

*bulletin d'adhésion joint à cette revue*

### en France

*pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs*

**Baugé (49) - Château de Grésillon**

<http://gresillon.org/?lang=fr>

**Bouresse (86) - Kvinpetalo**

<http://www.kvinpetalo.org>

### ailleurs en Europe et dans le monde

**juillet 20-27 - Maceió (Brésil) :** 57e Congrès International de l'Éducation - Eo ILEI.

<https://2024.kongreso.org>

**août 3-10 - Arusha (Tanzanie) :** 109e Congrès mondial d'espéranto

<https://uk.esperanto.net/2024>

**août 5-11 - Oporto (Portugal) :** 93e Congrès de SAT

<https://sat2024.porto.esperanto.pt/>

**août 18-25 - Šventoji (Lituanie) :** 80e congrès international de la Jeunesse (TEJO)

<https://ijk2024.tejo.org/>

**août 24-31 - Montecatini Terme (Italie) :** 90e Congrès italien d'espéranto

<https://kongreso.esperanto.it/90/>